# *Junulara forumo Pensante Amerikoj*



Havano, 23 mar (RHK) Pli ol 400 reprezentantoj de la diversaj sektoroj de la socio partoprenas tiun ?i eventon, kiel parton de la agadoj anta? la 8-a pintkunsido de la Amerikoj.

La kontribuo de la junularo al  la sociekonomia evoluo de Kubo, la aktualigo de nia modelo, la sociaj atingoj kaj la scienca evoluo, estas kelkaj el la temaj aksoj de la junulara forumo Pensante Amerikoj, kiu okazas ?i-vendrede en la havana universitato.

La eventon kunvokis la studentaj organizoj kaj junularaj movadoj, kaj sesias en tri paneloj kiujn partoprenas specialistoj kaj profesoroj por pritrakti la temojn rilatajn al demokratio, civitana partopreno kaj homaj rajtoj, cele al la forumo de la civila socio de la estonta regiona pintkunsido, okazonta en Peruo la venontan monaton.

La unua sekretariino de la nacia komitato de la unui?o de komunistaj junuloj Susely Morfa, elstarigis la gravecon de tiu ?i spaco, ?ar ?i estas spegulo pri la parrtopreno de la novaj generacioj en ?iuj agadoj de la socialista sistemo, kaj tie oni debatos kernajn temojn, interalie, la homajn rajtojn kaj kiel kontribui al mondo pli justa kaj egaleca.

# Radio Habana Cuba